„Mutig vorwärts!“

Aŭstria Esperantisto

„Kuraĝe antaŭen!“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

6a jaro. No. 1 Monata Januaro 1929

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25, alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Der Herr Bundespräsident

hat den Ehrenschutz über das Internationale Esperanto-Museum und die im Jahre 1929 stattfindenden Internationalen Esperanto-Veranstaltungen in Wien übernommen.

Z. 362 Präsid.-Kanzlei, 15. I. 1929.

Esp. — Verständigungsmittel f. Wissenschaftler.

Der deutsche Ingenieur Max Leo, der an das Nationallaboratorium der Technischen Hochschule in Osaka (Japan) berufen worden war, unterrichtete seine Mitarbeiter im Laboratorium in Esperanto, da es das einzige Mittel ist, sich leicht auch mit Japanern zu verständigen.

Literatur-Wettbewerb.

Die englische Zeitschrift "International Language" — London schreibt folgenden Wettbewerb für Originalarbeiten in Esperanto aus. Einreichtermin bis 31. Jänner:

1. Originalnovelle mit nicht mehr als 2500 Wörtern,
2. Originalgedicht mit nicht mehr als 30 Versen,
3. Übersetzung eines Gedichtes aus einer Nationalsprache mit nicht mehr als 30 Versen unter Einsendung des Ursprungtextes.

Der **Minister für Volksbildung** stellte H. A. Grigorov als Lektor f. Esperanto am staatlichen Blindeninstitute in Sofia an.

Die bedeutende **Radiozeitung „World-Radio“**-London veröffentlicht seit 4. Jänner 1929 in einer eigenen Rubrik einen Esperanto-Kurs und das Programm der Esperanto-Sendungen der verschiedenen Radiostationen.

Hakodate (Japan). Die Lokalzeitung hat während des ganzen Monates August einen Esperantokurs veröffentlicht. Die Esp.-Gruppe führt jetzt 20 Kurse.

„Koblenzer Volkszeitung“ bringt allwöchentlich einen Artikel in oder über Esperanto.

Die „Volks-Zeitung“

Es ist allgemein bekannt, daß seit dem Landeskongreß 1927 besonders die „Volks-Zeitung“ über die Vorkommnisse in der Esperantobewegung stets ausführlich berichtet. Ihren Willen, Esperanto möglichst zu fördern, beweist die Schriftleitung durch die Veröffentlichung eines groß angelegten Esperantokurses. Seit 13. Jänner d. J. wird den Lesern in der Sonntagsausgabe der „Großen“ und „Kleinen V.-Z.“ (notariell beglaubigte Sonntagsgesamtauflage 240.000 Exempl.) Gelegenheit geboten, sich mit den Grundzügen des Esp. bekanntzumachen. Der Verfasser des Kurses ist unser geschätzter Mitarbeiter R.-R. Ludwig Siedl.

Wir empfehlen unseren Lesern, ihre Bekannten, die sie für Esp. gewinnen wollen, auf diesen Kurs der Volks-Zeitung aufmerksam zu machen.

„Grazer Volksblatt“ brachte am 4. u. 11. XI. sehr schöne, große Artikel von Dürschmid und Dr. Friedl über Esp. und am 8. XII. einen Artikel in Esp.

Der **„Städtische Angestellte“** brachte in seiner Festnummer anläßlich seines 10 jährigen Bestandes einen großen Artikel über Esperanto.

Esperanto-Gottesdienst

Wien, I., Michaelerkirche
17. Februar, 10 h.

Aŭstria Esperantisto
deziras feliĉigan jaron.

Kuraĝe antaŭen!

1929.

Nova jaro, nova kanto,
Nekonata al migranto:
Ĉu de bela melodi'?
Ĉu dolora nur por mi?

Nova jaro, nova vojo:
Ĉu malgaja, ĉu kun ĝojo
Mi trapaŝos bone ĝin?
Eble ĝi vundigos min . . .

Ĉu nur eble? Certe, certe!
Eĉ se forte mi kaj sperte
Volus iri sen suspekt',
Mi ne migros sen difekt'.

Tamen mi ne deflankiĝu,
Ankaŭ ne malkuraĝiĝu,
Ĉar amikoj estas du:
Am' kaj devo! Restu plu!

Orig. verk. de Karl Haager-Wien.

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio Wilhelm Miklas

Protektoro de
„Internacia Esperanto-Muzeo en Wien"
kaj de la „Esp.-aranĝoj en Wien 1929"
(„Antaŭkongreso al XXI-a" kun
„Malfermo de Intern. Esp.-Muzeo").

Prezidanto Wilhelm Miklas akceptis la 19. de decembro 1928 la prezidanton de Loka Kuratora Komitato de IEMW, ĉefinspektoron Steiner, kiu transdiris salutvortojn de la internaciaj organizoj en Genève kaj de la neŭtrala aŭstria E.-movado, detale informis la prezidanton pri Intern. Esp.-Muzeo kaj ties malfermo en julio 1929 kaj petis, ke la prezidanto afable akceptu la protektoraton pri Muzeo kaj la koncernaj aranĝoj. Prezidanto Miklas afable akceptis. S-ro Steiner ankaŭ transdonis al la prezidanto la numerojn de „Aŭstria Esperantisto" kaj „Heroldo de Esperanto", kiuj enhavis artikolojn pri la prezidanto mem, kaj tole binditan jarlibron de UEA, kiun dir. Hans Jakob estis doninta al Steiner por ĉi tiu celo.

Internacia Esperanto-Muzeo.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio,
Wilhelm Miklas.

Leteradreso: Wien, I., Annag. 5.

Sekvas la en E.-on tradukita kontrakto:

Kontrakto:

Punkto 1. La unuiĝo „Internacia Esperanto-Muzeo en Wien" transdonas propraĵe al „National-Bibliothek en Wien" ĉiujn jam nun de ĝi posedatajn kaj por la muzeo alproprigotajn librojn, gazetojn, flugfoliojn kaj ĉian materialon taŭgan por bibliotekista konservado en scienca biblioteko. Sed sub tio estu komprenataj nur unuaj kaj duaj ekzempleroj; pluaj restas posedaĵo de l'nomita unuiĝo por ebligi laŭstatutajn novakirojn.

Punkto 2. National-Bibliothek starigos tiun havaĵon kiel kolekton apartan („Corpus separatum"), laŭ eblo en aparta ejo, kaj traktos kaj administros ĝin en egala maniero kiel la havaĵojn akiritajn de ĝi mem.

Punkto 3. Uzante la havaĵojn venintajn al National-Bibliothek pere de la unuiĝo, la membroj de la unuiĝo ĝuas la privilegion, ke je montro de ilia validanta membrokarto kaj de identecon pruvanta legitimacio kun portreta fotografaĵo la uzantbiletoj por la presaĵ-kaj gazetlegejoj estas eldonataj al ili senpage, tiel ke de la unuiĝanoj povas esti uzataj senkoste ne nur la pecoj venintaj al National-Bibliothek pere de la unuiĝo, sed same ĉiuj aliaj havaĵoj de National-Bibliothek en la presaĵ- kaj gazet-legejoj.

Punkto 4. Kiomlonge National-Bibliothek por la starigo kaj ordigo de la havaĵoj transprenitaj de l' unuiĝo ne povas liberigi apartajn ejojn, ĝi disponigas al la unuiĝo la ĉambron n-ro 46 en Aŭgustinerstöckl kiel provizoran deponejon por starigopretaj havaĵoj. La definitiva solvo de la priloka problemo okazos post translokiĝo de la presaĵkolekto de National-Bibliothek en la pretigotajn ejojn de Nova Kastelo.

Wien, la 30. de septembro 1928.

Por la unuiĝo „Internacia Esperanto-Muzeo en Wien":

La sekretario:	La prezidanto
Walter Smital, m. p.	Steiner, m. p.

Por „National-Bibliothek en Wien":
La ĝenerala direktoro:
Bick, m. p.

La membroj de IEMW afable sendu sian jarkotizon por 1929 sv. fr. 1.20 en UEA-kuponoj al ni.

En la „Intern. Kuratoran Komitaton" eniris laŭ nia invito prof. d-ro Bruno

Migliorini-Roma kaj s-ro Gaetano Facchi-Brescia por Italujo.

Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj n-roj 124. Laborista E.-Asocio-Leipzig, 125. Brita E.-Asocio-London, 126. d-ro Sós-Wien, 127. P. A. Schendeler-Eindhoven, 128. Bulgara E.-Asocio-Rcse, 129. Gaetano Facchi-Brescia, 130. H. Sentis-Grenoble, 131. H. I. Bulthuis-Haag, 132. Bahaa E.-eld.-Wandsbeck, 133. Dalmaŭ Liceo-Barcelona, 134. d-ro Spielmann-Bern, 135. Bohema E.-Servo-Moravany v. Č., 136. H. J. Tninder-Sorabaja, Nederl. Hindujo, 137. Serumo-Instituto de Bruta Infektmalsano, Formosa, Japanujo.

Mono alveninta:

Esperantista Klubo-Česke Budejovice, grave subteninta ĝis nun IEMW, denove donacis je Novjaro 100 Kč. — Ni elkore dankas al la grupo kaj ties prez. generalo Rambousek.

Aliaj subtenantoj por 1929: Gaetano Facchi-Brescia, Macek Alojz-Bôr, Sv. Mikulas, kaj la ĝis nun al Antaŭkongreso aliĝintaj, kiuj jam per pago de l' kongres-kotizo fariĝis membroj por 1929: Vidu la liston sub „Antaŭkongreso".

Ĉiu estu membro de IEMW.!

Por Loka Kuratora Komitato:

Smital, sekr. Steiner, prez.

XXI-a en Budapest

2.—9. de aŭgusto 1929.

Komuna veturado per ŝipo al Budapest. Kotizo Ŝ. 35.—. Tuj anoncu vian aliĝon. Adreso: Esperanto-Kongreso, Budapest.

„Antaŭkongreso al la XXI-a" kun „Malfermo de Intern. Esperanto-Muzeo en Wien"

Wien, 29. VII. — 1. VIII. 1929.

Leteradreso: Wien, I. Annagasse 5.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio Wilhelm Miklas.

Internacia Honora Komitato:

Aŭstrio:

Kanceliero d-ro Seipel
Ministro p. Instruado Schmitz
Ministro p. Komerco d-ro Schürff
Landestro d-ro Buresch
Vicurbestro de Wien Hoss
Ĉefepiskopo de Wien kard. d-ro Piffl
Sekcia ĉefo d-ro Uebelhör
Ĝeneraldirektoro de National-Bibliothek Univ. prof. d-ro Bick
Univ. prof. d-ro Molisch, membro de Akademio por sciencoj en Wien
Prof. de Teknika Altlernejo d-ro d-r' inĝ. Schumann
Ĝen. direktoro de fervojoj d-ro Maschat

Belgujo:

Ambasadoro Le Ghait en Wien

Germanlando:

Ambasadoro Grafo Lerchenfeld en Wien

Japanujo:

Ambasadoro Morie Ohno en Wien

Esperantujo:

Prof. Cart, prez. de Esp.-Akademio en Paris
Generalo Sebert, membro de Scienca Akademio en Paris
Leono Zamenhof en Warszawa.
Aliaj sekvos.

Kotizo: aŭ. Ŝ. 7.— aŭ Dol. 1.— aŭ sv. fr. 5.25 aŭ Rm. 4.25 aŭ brit. Ŝ. 4.— aŭ nederl. guld. 3.20 aŭ belgaj fr. 7.25, al la kasisto d-ro E. Sós, Wien, I. Tuchlauben 18 per poŝtmandato. Aldonu 10 groŝojn, kiujn ni devas pagi al la leterportisto.

Por ĉi tiu malgranda kotizo vi ricevos kongreskarton, kiu sola rajtigos vin je rabatita veturado sur fervojoj kaj ŝipoj en Aŭstrio kaj al Budapest, senpagan vizon, sen kurado al la konsulejo, senpagan abonon al Aŭstria Esperantisto dum la unua duonjaro 1929 kun la sciigoj pri la kongresaranĝoj kaj la muzeaferoj, kongresinsignon, gvidlibron tra Wien, membrecon al Int.-Esp.-Muzeo por 1929 kun membrokarto ktp.

Programo:

29. de julio 1929:

Kuniĝo de la karavanoj de UEA kaj Mosse kaj de la aliaj samideanoj en Linz kaj de tie komuna veturo per ŝipo al Wien. Alveno je la 6-a vespere. Intertempe venos al Wien la samideanoj trans Graz, Bruck a. L., Bratislava, Breclava, Gmünd, ĉiujn arigos salutkunveno kun komuna vespermanĝo.

30. de julio:

9 h Gvidado tra Malnova Wien en grupoj.
13 h komuna tagmanĝo
14 h ekskurso per tramo kaj malgranda promenado al Kobenzl—Kahlenberg, tie je belega rigardo al Wien vi trinkos bonan kafon
19·30 h komuna vespermanĝo en Rathauskeller (bonaj vino kaj biero).

31. de julio:

10 kaj 11 h oficialaj akceptoj
12 h Malfermo de Int. Esp.-Muzeo en la kupolsalonego de National-Bibliothek en ĉeesto de la plej altrangaj personoj.
13·15 h fotografado sur Josefsplatz antaŭ National-Bibliothek
13·45 h komuna tagmanĝo
14·45 h veturo per tramo al Schönbrunn (laŭvole vizitado de l' kastelo, Tivoli, menaĝerio, palmojdomego)
19 h komuna vespermanĝo.

1. de aŭgusto:

8 h matene per komuna ŝipo al Budapest.

La prezoj: Loĝejo de Ŝ 4.—, kompleta matenmanĝo 1.20, tagmanĝo (supo, rostaĵo kun aldonaĵo, farunaĵo) 2.—, vespermanĝo 2.50.

Aliĝis ĝis nun 40 personoj. La liston ni publikigos pro manko da loko en februara numero.

Uzu afable la aldonitan aliĝilon! Sendu la kotizon de Ŝ. 7, niaj abonantoj de Ŝ. 5 en poŝtmarkoj per simpla letero aŭ aldonu 10 gr. por poŝtmandato.

Por Prepara Komitato:
Hovorka sekr. Steiner prez.

Memorfesto al nia Majstro kaj kolonelo Zwach.

En la belaj klubejoj de I. Esperanto-Unuiĝo en Wien komenciĝis la paroladprogramo 1928/1929 per la memorfesto al d-ro Zamenhof kaj kolonelo Zwach la 14. de decembro.

Ĉeestis anstataŭante la francan ambasadoron grafon Clauzel, lia leg.-sekr., sekcia ĉefo d-ro Uebelhör el la kancelierejo, ĝen. dir. univ. prof. d-ro Bick de National-Bibliothek kaj la samideanoj kort.-kons. d-ro Schumann (Teknika Altlernejo), d-ro Wollmann, d-ro Heeber, Klečka, pol.-kons. Buchsbaum kaj multaj aliaj. „Reichspost" reprezentis redaktoro d-ro Tater.

Ni citas kelkajn senkulpigleterojn:

Der Bundeskanzler Wien, 14. Dezember 1928.

Sehr geehrter Herr Oberinspektor!

Mit großem Interesse habe ich Kenntnis genommen von dem mir freundlichst übersendeten Vortragsprogramm Ihrer angesehenen Esperanto-Vereinigung, aus dem ich mit lebhafter Befriedigung die rege und umfassende Tätigkeit Ihres Vereines feststellen konnte.

Indem ich für Ihre liebenswürdige Einladung zur Teilnahme an Ihren bevorstehenden Veranstaltungen verbindlichst danke, bitte ich Sie versichert zu sein, daß ich mit großem Vergnügen in Aussicht nehme, einem oder dem anderen Vortrag beizuwohnen, soferne mir dies die Amtsgeschäfte irgendwie ermöglichen sollten.

Leider bin ich infolge anderweitiger Zusage verhindert, bei Ihrer Zamenhof-Feier zu erscheinen, und ich bitte Sie, mein Fernbleiben gütigst entschuldigen zu wollen.

Empfangen Sie, sehr geehrter Herr Oberinspektor, den Ausdruck meiner vorzüglichsten Hochachtung.

Ihr ergebener Seipel.

Der Bundesminister für Heereswesen Wien, 12. Dezember 1928.
Adj. Zahl 774.

„. . . . Wenn es meine dienstliche Inanspruchnahme irgendwie gestattet, werde ich mir gewiß gerne einmal das Vergnügen nehmen, von der Einladung Gebrauch zu machen . . . ."

Vaugoin.

Bürgermeister der Stadt Wien Wien, 15. Dezember 1928.

Sehr geehrter Herr Oberinspektor!

Für die freundliche Übersendung des Vortrags-Programmes des Ersten Wiener Esperanto-Vereines und Ihre geschätzte Einladung zum Besuche dieser Veranstaltungen danke ich bestens.

Leider bleibt mir bei der Fülle meiner Obliegenheiten so wenig Zeit, daß ich oft selbst das Wichtigste versäumen muß. Ich fürchte daher, daß ich mir es auch werde versagen müssen, zu Ihren interessanten Vorträgen zu kommen und bitte Sie in diesem Falle, mein Fernbleiben zu entschuldigen.

Mit dem Ausdrucke vorzüglichster Hochachtung
Seitz.

„. . . . Ich bedaure meine Abwesenheit bei dieser Gedenkfeier um so mehr, als ich mir der Bedeutung der Esperanto-Bewegung für das Wirtschaftsleben der Völker und für den internationalen Verkehr voll bewußt bin . . . ."

Hoß.

Krome senkulpigis sin: Ministro Thaler, prez. de Oberster Rechnungshof, ekscelenco Max Wladimir Beck, vicurbestro Emmerling, sekcia ĉefo d-ro

Weigel (ministerio por financoj), rektoro de konsulakademio sekcia ĉefo Winter, prez. de DDSG. sekcia ĉefo Schonka, ĝen. dir. Czeija kaj dir. d-ro Schwaiger de Ravag, prez. de Paneŭropa Unio R. N. Coudenhove-Kalergi kaj ties ĝen. sekretarioj, ĝen. sekr. de Bundesbahnen Steyrer, mag. kons. Breunlich, Svehla-Gramatneusiedl, Cipera-Linz, Lidl-Salzburg, prof. Hiessl-Klosterneuburg, Raffelseder-Wien k. a.

S-ino Valerie Zwach, la vidvino de nia „kolonelo", ne povis ĉeesti pro malsano.

Prez. Steiner salutis la gastojn kaj grupojn, la lastajn kiel kungastigantojn. Respondis reprez. de EDW. Čech kortuŝite.

La festparoladon faris katolika eldonisto Hovorka, la memorparoladon je kolonelo Zwach d-ro Sós. F-ino Hödl deklamis „Ho, mia kor'" kaj „Mia penso" de Zamenhof kun germana traduko de Zwach. La muzikan parton bonege prizorgis fama kvarteto gefratoj Galimir, kiujn ni speciale dankas.

Eksambasadoro d-ro C. Th. Dumba pri Esperanto.

En la belaj klubejoj de I. Esp.-Unuiĝo en Wien parolis la 11. de jan. d-ro Dumba, eksambasadoro aŭstria en Usono kaj prez. de Aŭstria Societo por „Ligo de Nacioj" pri „Ligo de Nacioj kaj la germanoj". Ĉar la eminenta parolinto petis, ke oni komuniku lian nunan opinion pri E. al la esp.-istoj en ilia lingvo, tion plenumis s-ro Smital. Ĉar ni opinias, ke tio interesos pli vastajn rondojn, ni publikigas laŭvorte la tekston laŭ la manuskripto de lia ekscelenco:

„Nia societo agas ne nur por la ideo de Ligo de Nacioj vera, tio estas de organizaĵo porpaca sur la bazo de plena egalrajteco de ĉiuj nacioj kaj ŝtatoj, sed antaŭ ĉio por la interkomprenigo de la nacioj, tio estas por la kreo de intelekta kaj morala atmosfero, kiu estas la antaŭkondiĉo por la plenumo de la paciga misio de Ligo de Nacioj. Sed tiu interproksimigo de la nacioj, la iom-post-ioma forigo de la malfido, malsimpatio, ja de malamo inter la iamaj malamikoj dummilitaj premisas, ke la unuopaj nacianoj el ambaŭ tendaroj ankaŭ povas kompreni sin reciproke, tio estas, ke ili posedas komunan interkomprenigilon, ĉar ne komprenante sin reciproke laŭ vortoj oni ankaŭ ne povas interkomprenigi sin anime. Mi estas konvinkita, ke la ekzisto kaj la ĝenerala alpreno de tia interkomprenigilo, kia estas Esperanto, efike akcelus kaj plirapidigus la mensan interproksimiĝon de la nacioj. Tion konsiderante ni salutas la esp.-istojn kiel bonvenajn samliganojn, al kiuj ni povas apenaŭ sufiĉe danki pro ilia pionira laboro. Mi mem havis dum iom longa tempo la impreson, ke la angla lingvo estas la mondlingvo kaj povus anstataŭi Esp.-on. Sed nun mi kredas, ke la spirito de tiu lingvo estas tiom fremda al tiu de la latinidaj lingvoj, ke la latinidlingvaj nacioj nur tre malfacile povus ellerni la lingvon anglan, por tute ne paroli pri la malfacilaĵoj prononcaj.

Tial mi opinias, ke Esp. speciale por Eŭropo estas eksternorme valora interkomprenigilo, al kies disvastiĝo kaj fina venko mi deziras plejan sukceson."

La sekvinta germanlingva parolado vekis en la aŭskultintaro egan entuziasmon, kiu je la fino eksplodigis dufojan aplaŭdadon. Nur malofte oni ja aŭdas tiel elegante parolantan fakulon, kiu kapablas klare skizi tian komplikan materion, kia estas la internacia politiko. Ne mirinde do, ke multaj esprimis la deziron, ofte aŭdi tian bonegan oratoron.

La grupoj kaj izoluloj elkore estas invitataj kaj petataj, veni mem kaj venigi konatojn al Amuzvespero de „Unuiĝo". Per bona vizitado la esp.-istoj montros al la gastoj, ke ekzistas veraj samideanoj en Wien. Per forresto vi malutilus unuavice al Esperanto, tio estas: al vi men.

Tre ŝatataj legantoj!

Kiuj el vi ne malmendis AE. ĝis antaŭ presado de ĉi tiu numero, restas abonantoj, ĉar ankaŭ por il ni presigis la numerojn. Sed ili ne bedaŭros, ĉar speciale en ĉi tiu jaro ili legos multon interesan pri niaj aranĝoj en Aŭstrio ktp. Ni petas, ke la ankoraŭ nepagintaj bonvolu nun sendi la kotizon de Ŝ. 4·80 por 1929 aŭ almenaŭ la unuan duonon kiel partpagon.

Originala verkaro de d-ro Zamenhof.

Laŭ materialo kolektita de d-ro Dietterle, direktoro de E-Instituto por la Germana Respubliko, estu eldonota libro »Orig. verkaro de d-ro Zamenhof«. Ĝi montru la majstron en lia evoluo, liajn pensojn, proponojn kaj ideojn pri organizo kaj pri la evoluo de la lingvo, liajn juĝojn pri ĉiuj okazintaĵoj en E., liajn esperojn, suferojn. La libro ampleksos krom aldonotaj faksimiloj de la unua E.-gazeto kaj originalaj leteroj, proks. 500 pĝ., formato 14·5×22·5 cm. Ĝia prezo estos pksm. Rm. 12.

La eldonprocedo nur komenciĝos, se ĝis 31. de jan. 1929 almenaŭ 1000 personoj antaŭmendos la verkon je favora prezo de Rm. 9.— ĉe la eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig.

Vidu! SAT-vortaron antaŭmendis 1000 celkonsciaj esp.-istoj.

Ne postrestu! Vi mendu tuj »Originalan verkaron de d-ro Zamenhof«!

Sennaciulo skribas en sia n-ro 219, pĝ. 91: „En AE. (nov.) ni legis, ke Heroldo estas nia sola semajna gazeto. (!)

La redaktoro de AE. kredeble suferas je okul-difekto, aliel li ne povus esti malrimarkinta, ke jam en la 5-a jaro aperas tute regule ĉiusemajne la esp. lab. gazeto „Sennaciulo", kaj ke ĝi eĉ havas pli ol unu milon pli da abonantoj ol la „sola semajna Heroldo".

Ni bone konas „Sennaciulon" kaj kun intereso ĝin ĉiam legas kaj eĉ tre ofte represas el ĝia enhavo, ĉar AE estas vere neŭtrala organo. Pro tio AE. ankaŭ instigis al abono de Heroldo, kiu estas **„nia sola neŭtrala** semajna gazeto".

Esperanto-Praktiko!

Pro malgranda abonantaro firmo Mosse decidis pri ĉesigo de ĉi tiu bonega gazeto, kiu ĉefe pritraktas lingvajn demandojn kaj per tio multe helpas la progresintojn je pliperfektiĝo. La fondinto kaj nuna redaktoro, nia konata LK.-ano Fr. Ellersieck-Berlin sukcesis, ke Mosse daŭrigos la eldonadon en la espero, ke 500 novabonoj venos.

Do ankaŭ vi kunhelpu, por restigi vivanta Esperanto-Praktikon!

Postulu senpage la januar-numeron de R. Mosse (Esperanto-Fako), Berlin SW 19, Jerusalemstr. 46—49.

Gravaĵoj.

Zamenhof-strato en Wien. Laŭ raporto de „La socialisto" la urba konsilantaro decidis nomi straton en la XII. distrikto laŭ nia majstro. Iniciatis tion Aŭstria Laborista Ligo Esp.-ista, kiun ni elkore gratulas pro ĉi tiu sukceso.

„Volkszeitung" en ambaŭ eldonoj, „granda" kaj „malgranda" en 240.000 ekzempleroj, publikigas depost 13. jan. ĉiudimanĉe E.-lecionojn. Verkas ilin s-ano L. Siedl, peris la aferon R. M. Frey. Koran dankon al ambaŭ!

Originala stenografisistemo por Esperanto de prof. Ewald Brabbée. Tiu en fakistaj rondoj internacie konata eminentulo, interesite por E. de nia diligenta Karl Haager, science studis la lingvon kaj verkis stenogr. sistemon ne adaptitan sed originalan por E. — Ĝi estas mirinde facile lernebla, bela, nekre-

deble praktika, aperos post unu monato, mendebla ĉe A. E.

E.-hoteloj en Wien. „Excelsior", I., Rotenturmstr. 24, kaj „Hotel de France", I., Schottenring 3, fiksos ĉe la enirejoj tabulojn „Esperanto-Hotelo".

ICK — Ĝenevo petis en sia cirkulero n-ro 43 pro publikigo de jenaj aferoj:

E. en Komercaj lernejoj: La Soc. Franca por la Propagando de E. ĵus starigis statistikon pri E. en komerco-lernejoj. Por faciligi internacian informadon ni petas sendi al ni ĝis 10. februaro la sekvantajn indikojn, kiujn ni kolektos kaj tuj sendos al ICK — Ĝenevo:

1. En kiom da komerclernejoj de via urbo estas enkondukita E. en instru-planon?

2. En kiom da lernejoj okazas instruado a) fakultativa, b) deviga, c) eksterplane kiel kursoj?

3. Ĉu ekzamenoj okazas laŭ oficiala regularo kaj laŭ kiu? (Citu la koncernan dekreton!)

„Radio & Esperanto", de kiu bonega broŝuro G. E. A., Johanniterstr. 9, Berlin SW 61 disponas ankoraŭ pri sufiĉa kvanto.

Ŝlosiloj. Aperis ĵus novaj eldonoj de la normigita ŝlosilo en la lingvoj Nederlanda: Eld. E. Blok, Vechtestr. 60, Amsterdam; Rumana: Eld. Komitato p. la Rumana Ŝlosilo, s-ro S. Prager, Str. Piata Amoi 15 bis, Bucuresti 3. Mendojn oni direktu al la eld. aŭ al UEA.

P. T. T. La C. O. de Esp.-istoj de Ligilo de USSR. aperigis broŝuron de N. Modonov pri E. en la sferoj de poŝtistoj, telegrafistoj kaj telefonistoj (PTT) de Sovet-Respublikoj. Havebla de P. Filliâtre, 54, rue Custine, Paris 18 por sv. fr. —.20 po ekzemplero.

Instruiloj: Interesitojn pri la intuicia instrumetodo por E. ni atentigas pri la Instruilo de Benson-School of E., Inc., 518 Broad Str., Newark, New Jersey, U. S. A. (Recenzo en venonta n-ro de AE.) ICK.

„Das Esperanto ein Kulturfaktor" festskribaĵo okaze de l' 17. Germana E.-Kongreso, kompostita de Alex. Schwarz. Bonega germana propagandilo por ĉiu, 140 paĝoj. Vidu la recenzon en AE. n-ro 9 el 1928. Favora prezo por niaj legantoj Rm. 2.— anstataŭ Rm. 2.80 plus sendkostoj. Mendu ĉe Germana E.-Asocio, Berlin, SW 61, Johanniterstr. 9.

18-a Germana E.-kongreso je Pasko en Frankfurt a. M. Adreso: S-ino E. v. Studkrad, Holbeinstr. 41. Kotizo: Rm. 8, familianoj Rm. 5.

XIV-a Intern. Kongreso de katolikaj esp.-istoj okazos en Praha.

Svedujo: S-roj Ĉe kaj Morariu gvidas en diversaj lokoj kursojn kun bonega sukceso. En Svedujo la movado per tiaj aranĝoj multe progresas.

Pri **Sat-Vortaro.** Preskaŭ 1000 personoj jam antaŭmendis kaj pagis la 450—500 paĝan vortaron, kiu estos eldonata en 1929.

E.-gvidlibro **„Zittau kaj ĝia montaro"**, verkita de s-ro Knoll, estas senpage havebla. Mendu ĝin germanlingve ĉe Verkehrsverein E. V., Zittau (Saksujo), Weberstr. kaj menciu nian gazeton.

Antwerpen: La komitato de la Mondekspozicio (Kolonioj, Navigacio, Flandra Arto) aprilo-oktobro 1930 eldonis varbfolion kaj glumarkon esp.-lingvajn.

Urĝa peto!

Kun granda surprizo ni sciiĝis, ke malgraŭ ĉiuj niaj klopodoj, eksigi ĉiujn plendojn pri ne kvitancita monsendo por forigo de la kongresa deficito el la XVIa, aŭ pri nerespondo al leteroj, troviĝas nun ankoraŭ samideanoj, kiuj ne estas kontentigitaj. Mi petas ĉiujn tiujn, precize informi nin, por ke ni povu kontroli la aferon.

Kun antaŭa danko

I., Tuchlauben 18 Wien (Aŭstrio). Por L. K. K. — Wien: D-ro Edmund Sos komitatano de UEA.

Pro manko de spaco en nia gazeto ne estas eble, aparte presigi la nomojn de ĉiuj unuopaj aĉetantoj de subvenciaj kuponoj. La redakcio.

☆ ☆ ☆

Nia organo estas informilo. Erara estus la opinio, ke ĝi servu por personaj atakoj. Ankaŭ la du sekvantaj artikoloj celas nenion alian ol komprenigi per faktoj, kial la landa organizo sin fine devis liberigi de la aluditaj personoj. Ni bezonas por la estonto: Ordon, sincerecon kaj laboreblon!

Kion vi diras?

En Aŭstrio preskaŭ ĉiuj gvidantaj personoj estas favorigitaj al E. kaj ili protektas resp. subtenos la oficialajn E.-aranĝojn en somero nunjara.

Pro tio la serioza parto de nia esp.-istaro konsentis pri la neceso, firmigi la ĝis nun vere ne solidan bazon de la movado per kreo de leĝe registrita organizaĵo landa. Malgranda areto, al kiu tre plaĉis la ĝisnuna neregulita sistemo delegitara, kiu trovis precipe ĝin ideala, praktika kaj pro tio imitinda, kontraŭbatalis la firmigon. Spirita gvidanto: D-ro Emil Pfeffer. Li tamen eniris komitaton por preparo de statutoj

por nova aŭstria E.-„Ligo". Sed ne laborante laŭ tiu komisio de l' kongreso en Korneuburg li kontraŭe per pasiveco kaj pasivigo de aliaj kunkomiisitoj prokrastis la aferon uzante la tempon — por fondi kontraŭorganizon sub la senkulpŝajna titolo „Ligo" de Esperanto-amikoj.

La 6. de januaro okazis konferenco por fini la statutaferon kaj fine fondi firman organizaĵon laŭ germanregna modelo, por kiu ni pro la „Ligo" fiksis la titolon „Aŭstria Esperanto-Asocio". Tie la grupreprezentantoj denove spertis, ke kunlaboro kun Pfeffer kaj liaj samideanoj ne estos plu ebla. Pro tio la grupoj ekster kaj grandparto de tiuj en Wien eksiĝis el la kaŭĉuka kaj pro tio por kelkaj tre oportuna AED., kaj findecidis pri la dum monatoj preparitaj statutoj. Ilin aprobis la regna estraro jam la 8. de januaro.

Kaj nun miru, mondo esperantista!

„Kiu kompromitas nian movadon?"

Sub ĉi tiu titolo en Heroldo aperis en julio 1925 kelkaj artikoloj pri s-ro Franz Josef Schade. La kompromitado estas bedaŭrinde ankoraŭ aktuala. S-ro Schade de tiu tempo estis retirinta sin (anstataŭ sin defendi) kaj kelkfoje deklaris, ke li ne plu emas ludi rolon en nia movado. Seriozajn homojn kontentigis tio, ĉar en multaj internaciaj kunvenoj aŭstrianoj devis sperti, ke nur elparolante la nomon Schade oni vekis per tio bedaŭrindan indignon, malemon kaj malfidon kontraŭ aŭstriaj aranĝoj. La aŭtoro de ĉi tiuj linioj konfesas, ke li mem kunkulpas je tio, ĉar li tiam provis savi s-ron Schade. Ĉar minacas denove danĝero per lia reapero, la esp.-istaro estu ĝustatempe informata.

Kiam la kongresafero en 1924 estis jam komencita, inter la esp.-istaro de Wien aŭdiĝis kelkaj voĉoj kontraŭ la kongreso, de homoj sen respondeca sento, kiuj per sia sintenado poste tre malfaciligis la situon de LKK. Kaj, kiam mi ekagis, por helpi al la bedaŭrindaj viktimoj de sia idealismo (Zwach †, Hartwich †, Steinbauer †, Sós ktp.) ĝuste la antaŭe alouditaj atakis min pro mia helpemo — al Schade.

Ĉu ne karakterizas ambaŭ partojn, ke la samaj personoj nun sin subigas al la gvidado de Schade?

Kio tiom rekomendas lin? Verŝajne liaj deficitoj je gazeto „Nova Tempo", librejo samnoma, ekspozicio en foirpalaco kaj la fama XVI-a!

Legantoj de Heroldo scias, kion signifas la adreso: Wien, VI. Mollardgasse 55. La unua subtena ago de Schade por la AED.-restaĵoj estas, ke li disponigis al ili ĉi tiun „konatan" adreson.

Bonvolu tial noti, ke por ĉiuj oficialaj aranĝoj en Aŭstrio servos de nun la adreso Aŭstria Esperanto-Asocio, Wien, I. Annagasse 5.

Ne personaj motivoj diktis al mi ĉi tiun informon (alie mi ne estus volonte subteninta la nomitajn personojn!). Sed nun, kiam la atento de influhavaj personoj estas direktita al nia movado, ĉiu respondeca homo en nia lando devas konfesi unu ĉefan necesaĵon: Purecon!

Hugo Steiner.

„Weltsprache"
„Bund der Esperanto-Freunde."

Du bonaj ideoj — bedaŭrinde fuŝitaj.

Ĉu vi malkonsentus E.-propagandilon por la germana publiko en Aŭstrio? Sed — ĉu vi opinias efika kaj tial necesa germanlingvan E.-propagandilon, kiu estas destinita por la germanlingva teritorio (!), eliras en Aŭstrio kaj estas redaktata de polo?

Due: Ĉu vi malkonsentus Ligon de neesp.-istoj subtenemaj, kiuj emas oferi monon al nia movado? Sed — ĉu „Ligo" taŭge subtenas nian movadon, kiu hodiaŭ estas esp.-ista, morgaŭ neesp.-ista (laŭ diversaj eldiroj de d-ro Pfeffer) kaj postulas de siaj anoj ĝis Ŝ. 10.— ĉiumonate, dum por la landa organizaĵo 60

groŝoj jare estis „tro multe"? Ĉu vi opinias ĝin taŭga progresigilo sub gvidado de homo, kiu mem deklaris bone scii, ke li nenion povas atingi ĉe la aŭstria publiko? Juĝu mem!

Neniu, kiu dum jaroj laboris kun ni, povas plendi (se li ne volas kalumnii), ke ni iam, ie, iel faris diferencon inter samideanoj laŭ nacieco, religio aŭ profesio. Sed ĉiugermano konsentos, ke ekz. la plej taŭga persono por varbi ĉeĥojn en Praha certe ne estas germano (vidu pro tio la bonan harmonion en Ĉeĥoslovakujo inter ĉeĥa kaj germana E.-ligoj).

Anonco: Neesperantistoj havigu al la E.-movado monon, la landan organizon la afero ne tuŝos. Fakto: Delegitoj pretendas paroli en la nomo de siaj 450 (?) esp.-istaj anoj kaj celas atingi per ties nombro voĉplejmulton en AED.-Konferenco. Eĉ la intenco fondi organizaĵon kontraŭ AED. poste ne povis esti neata de fidela „ligano".

Anonco: „Demokrata" estrarelekto post aniĝo de 500 membroj. Fakto: Sep personoj hazarde kunvenintaj (laŭ anonco al la polico „ĝeneralkunsido") elektis ĝin.

Anonco: En AED.-estrarkunsido la 29. sept. d-ro Pf. neis la ekziston de Lig-estraro. Fakto: La estraranonco al polico estas datita de l' 5. sept., subskribita de „d-ro Pfeffer, prezidanto."

Ĉu vi sentas apetiton je pluaĵoj tiaj? Ni povas liveri ilin.

Nun vi eble jam komprenas, kial St. deklaris, ke li daŭrigos sian laboradon nur sen d-ro Pfeffer; komprenos eble ankaŭ, kial tiu grupo ĉirkaŭ d-ro Pfeffer kontraŭagis fondon de AEA., nepre volas restigi la AED-torson (pro stampilo) kaj en sia plej nova fondaĵo „Raportoj de AED.," n-ro 1., eĉ ne rezignas uzi neĝustaĵojn kiel batalilon.

Simpla karto skribita al redakcio, kiu publikigis artikolon pri Esperanto, ofte pli utilas ol multaj disdonitaj propagandiloj!

Austria Esperanto-Asocio
Wien, I., Annagasse 5

AED.-AEA.

En la Aŭstria Esp.-Konferenco la 6. jan. ĉj. atgm. temis ĉefe pri la efektivigo de postuloj, faritaj dum la pasintjara Aŭstria E.-Kongreso en Korneuburg; tio estas la kreo de tutaŭstria organizo laŭ leĝa bazo. Ĝis nun la reprezentantoj de la provincaj grupoj, kiuj oferante tempon kaj monon, venas al konferencoj, kelkfoje jam spertis, ke ĉiam la samaj personoj el Wien malhelpis la laborojn per tute ne motivita opozicio.

Kelkajn tagojn antaŭ la lasta konferenco anoncis la novefondita „Ligo de Amikoj al Esp." (Bund der Esperantofreunde) sian aliĝon al AED. — Prez. Steiner malakceptis ĉi tiun aliĝon laŭ AED.-regularo § 6, (ĉar „Ligo" estis deklarita „neesperantista") lasante la findecidon al la konferenco mem.

Prez. Steiner malfermis la konferencon kaj proponis ŝanĝon de la tagordo tiel, ke „Weltsprache" estu unue pritraktata. D-ro Pfeffer estis kontraŭ la propono, sed deziris, ke oni konsentu la aliĝon de „Ligo". Hallamayr-Graz petis, ke Steiner raportu pri la motivoj de aliĝrifuzo de „Ligo". Steiner transdonis la prezidon al d-ro Sòs kaj raportis pri la kialoj de la rifuzo. Ĉar la deklaroj de Steiner estis malagrablaj al d-ro Pfeffer, liaj anoj ekkondutis tiom neparlamentece, ke la reprezentantoj provincaj anoncis la eksiĝon de siaj grupoj el AED. La saman faris Unua E.-Unuiĝo, Virina Sekcio, Teknik-akademia Klubo el Wien. (Oficĥavantoj ne estis reprezentitaj). D-ro Sòs fermis la kunsidon kaj forlasis la konferencejon kun la reprezentantoj de la nomitaj grupoj, kiuj posttgm. kunvenis kaj, ne ĝenate de tendenca opozicio, pridiskutis la novajn statutojn kaj konstitucion de Aŭstria Esperanto-Asocio (Österreichischer Esperanto-Bund). Specialon dankon meritas

niaj samideanoj en Graz. Ke en la posttagmeza kunsido regis plena harmonio, ne estas necese diri.

Jen la adresoj de la elektitaj estraranoj:

Prez.: Hugo Steiner, Wien, I. Annagasse 5
Viceprez. D-ro E. Sós, Wien, I. Tuchlauben 18
Prof. d-ro Fr. Christanell, Parsch-Salzburg
Afergvidanto: Nik. Hovorka, eldonisto, Wien, IX. Löblichgasse 3
Sekretarioj: Instr. Karl Haager, Wien, XVII. Gschwandtnergasse 38
Instr. Gustav Weber, Wien, II. Kl. Pfarrgasse 24
Kasistino: Instr. Marie Müllner, Korneuburg, Chimanigasse 29.

Ĝis nun elektitaj anoj de la konsilantaro:

Erwin G. Bernfeld, ĉefdel. de UEA., Wien, II. Czerninplatz 5
Willibald Rogler, oficisto, St. Peter bei Graz, Gartenstraße 11
Walter Smital, Radio-Wien, V. Kohlgasse 36
Hugo Steiner jun. stud. teĥ. arĥ. Bisamberg 248
Julius Szekely, fabrikanto, Wien, III. Untere Weißgärberstraße 49.

Ĉiuj ekfunkciu tuj post aprobo de la statutoj. Tiuj estis jam la 8. de januaro aprobitaj de la registaro kaj AEA.-estraro konstituiĝis sabate la 12. jan. Adreso: Aŭstria Esperanto-Asocio (Österr. Esp.-Bund), Wien, I., Annagasse 5, kie ĉiun mardon, ĵaŭdon kaj sabaton de 9—12h estas renkonteblaj funkciantoj.

Krom Esp.-grupoj povas aliĝi ĉiu izola esperantisto (§ 4, P. 2) pagante kotizon da S 1.20 po jaro.

Ni ne dubas, ke ĉiu serioza samideano kaj favoranto de nia movado ĝoje salutos la firman organizon kaj akcelos la ĉijarajn publikajn aranĝojn.

Kiu ŝatas laŭordan laboron, anoncu tuj sian aliĝon! Statutekzemplero aldonita!

Por Aŭstria E.-Asocio:

Hovorka	d-ro Sós	Steiner
afergvid.	vicprez.	prez.

Braunau: Zamenhof-festo okazis la 15. XII. en hotelo Fink, la ejo de la vigla grupeto. Kunhelpis al gefratoj Haselbauer, la iniciintoj de la tiea movado, ankaŭ f-inoj Spitzendoppler, Baumgartner, Gscheidlinger, s-roj Langer, Rameis kaj Wurm. Ĉeestis 3 gastoj el Linz, el kiuj s-ro Mraz faris paroladon. Nova kurso komenciĝis.

Graz: E.-Soc. „Emilio Peltier": Okaze de la naskiĝfesto de nia kara Majstro la societo aranĝis la 17. decembro 1928 „Zamenhofan solenaĵon", kiu estis bone vizitata. Vicprez. d-ro Friedl rakontis el la vivo de d-ro Zamenhof, f-ino Mentschik deklamis la poemon „La vojo" kaj s-ro Dürschmid prelegis parton el la malferma parolado de nia Majstro okaze de la IIIa Univ. E.-Kongreso en Cambridge. Fine pro la „Tago de la Esperantolibro" preskaŭ ĉiuj partoprenantoj aĉetis librojn, plejparte eldonaĵojn de la Eldonsocieto Sta Miĥaelo, Paris.

Karl Dürschmid.

Innsbruck: Je invito de Urania okazis en historia „Klaudia"-salonego paroladoj de H. Bederlunger mj., del. de UEA., dir. A. Mair, landestro por Tirolio, kaj d-ro Velkow, estrarano de E.-klubo pri Esperanto. El la granda aŭskultantaro sin anoncis granda aro por komencota kurso.

Wien: E.-soc. „Danubio" aranĝis la 19. 12. pro la jam okazinta komuna Zamenhof-Zwachfesto nur internan Zamenhof-memorvesperon. Post salutvortoj de prez. Čech laŭtlegis s-roj Majtaniĉ kaj d-ro Weingast el verkoj de Zamenhof. S-ro Vasta parolis pri la librotago menciante, ke la anoj aĉetis 80 librojn, kiujn ili donacis al la biblioteko de la societo.

Wien: E.-soc. Konkordo aranĝis la 15. 12. Zamenhoffeston, en kiu ĝi faris prezentadon de revuo „La Konkordanoj" kaj kantadon de la kantoj „La Konkordanoj" kaj „Gelöbnis", kaj „La turo de Babelo" en 5 bildoj.

Kat. Unuiĝo Esp.-ista: ĝenerala kunsido la 27. I. je la 4h ptgm. VIII. Piaristeng. 43/II. — Ĝi festis Zamenhof la 12. 12 per festparolado (s-ro Schiebl) kaj kantoj.

Wien, I. E.-Unuiĝo en Wien: Ĝeneralkunsido la 25. jan., precize je la 7 h. vesp. en la klubejo I. Annagasse 5; 1. febr. ekzercado por progresintoj sub gvidado de d-ro Sós; 8. febr. Granda Amuzvespero (vidu pg. 6); 15. febr. prelego de mag. A. Taussig.

Kath. Kreuzbündnis, I. Judenplatz 2/II komencis E.-kurson, senpage viziteblan, ĉiun ĵaŭdon de la 7h vesp.

Honorigo.

La anoj de E.-grupo en Baden surprizis kaj ege ĝojigis sian prezidanton Fronay je Kristnasko per transdonado de belega arĝenta cigaredujo kun enskribo. Sekretario Bittmann en flua E. esprimis la dankon de la grupo al la senlaca prezidanto.

Vere harmoniaj kaj ekzemplondonaj estas la rilatoj inter la anaro!

Gratulon

al nia samideano d-ro Karl Postl-Wien okaze de lia doktoriĝo.

Morto.

Mortis nur 30-jara la edzino de nia fervora samideano instr. Franz Watzinger-Villach. La kara mortintino multe helpis la edzon en lia E.-laboro. Ŝi ripozu en paço! Al la edzo nian elkoran kondolencon!

Solvo de la enigmo de K. Haager el n-ro 12: Londano, fulmzigzago, barbarismo, akceli, bastonado. „Danzig, Barcelona". Bonajn solvojn sendis: Erber-Graz, Pich-Kaltenleutgeben, Schöpfleuthner-Krems, Käte Haselbauer-Braunau, E. Dittrich, Rafelseder kaj J. Siml el Wien. Premiojn (libreton) ricevis: Dittrich, Haselbauer, Pich.

Korespondado:

PK. = poŝtk., Pl. = pk. il., L. = letero!
PM. = poŝtm., bfl. = PM. bildflanke.

Barcelona (Hispanujo): F. Curto Baste, Oliva 28 (Sagrera).
Nagykörös (Hungarujo): Ant. Khirer, PM.
Sheffield (Anglujo): L. Anderson, 5 Skipton Rd., Pttsmoor, L., PK.
Varberg (Svedujo): Gunnar Johansson, Skansgatan 26, L., PM. (Laŭ „Heroldo").

Rekomendindaj firmoj.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.
Gemischtwaren = Diversajoj:
Alois Cisar, Bisambergstr. 21.

Kaltenleutgeben.

Peter Pich, komercisto, Hauptstraße 61.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) »Pastete«, Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.
Esperanto-Klub, Gasthof »Grüner Baum«, Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenhof (Akademikerheim) Mi (me) 17·30—19·30 h.
I. Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Annagasse 5, I-a et., klubejoj de »Politische Gesellschaft«, Fr. (v.) 19·30 h.
Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schüffergasse 3, Mi (me) de 19 h.
Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.
»Konkordo«, IV., Margaretenstraße 33, (Cafe Aŭstria), Do (ĵ) 20 h.
Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Cafe Elsahof, Mo (l) 19—23 h.
Esp.-societo, »Danubio«, VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19—23 h.
Esp.-societo »Fideleco«, Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16—19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Franz Reifmüller, Wien, I. Johannesgasse 6